# Belo kiel imperativo de kulturo

*Vladimir I. IONESOV*

## Antaŭparolo

"Kio do savos la mondon? - Belo."
*F.M. Dostoevskij*

Ekde la tempo, kiam ekestis kulturo, naskiĝis multegaj vortoj –plej diversaj, simplaj kaj kompleksaj, plensonaj kaj ne tre, sed verŝajne neniu el ili povas esprimi la forton, la profundon kaj la internan sencon de la nocio "belo". Ĉiu, kiu provis klarigi ĝin, fiaskis aŭ transformiĝis en malemocian pedanton. Ne vane antikvaj ĉinaj saĝuloj avertis: "De kie ajn vi alproksimiĝas [al belo], ĉu de antaŭe aŭ de malantaŭe, tutegale vi vidos nek ties komencon nek finon". Do, la plej aŭtentika rimedo por primoki la homon antaŭ la vero, estas ebligi al li diskuti pri la temo de "belo". Belon oni ne povas pruvi, ĝin necesas vidi, aŭdi, senti – ĉar ĝi mem estas pruvo. Nesolvebla paradokso de belo devigis eksilenti eĉ la plejajn parolemulojn. Jen, kion sciigas al ni antikva ĉina libro de *Ljuĵŝi-Ĉunjcju* (150, p.106) (vd. *Tkaĉenko*, 1990: 212) el la III-a jarcento a.K.:

"Se vi komencos orientiĝi en kvinkolora ornamento
– ektumultos en la okuloj,
Se vi komencos distingi sonojn en kvintona muziko
– ekbruos en la oreloj,
Se vi komencos fingustumi kvin gustojn
– vi ekvomos".

Tamen, la tento de "la bela" estas tro granda kaj ĝi ĉiam instigas homojn mediti. Kaj kiel – se ne tiel? Ĉar temas pri materiajoj, priparolindaj, eĉ se vin insidas danĝero bruldifekti la flugilojn survoje al la suno. Mi intence ebligis al mi tiun ĉi antaŭparolon, por ĝustatempe sekurigi min kontraŭ eblaj mallaŭdoj kaj liberiĝi de ĉiaj devontigoj por eltrovi la veron. Mi riskos nur voĉigi kelkajn proprajn pensojn, kiujn vekas en mi la fenomenoj de belo.



Mi komencos de tio, ke la fenomenoj de belo estas eksterordinare multnombraj en la mondo. Ni trovas belon en la naturo, en homo, en la kulturo. Kio do devigas nin konsideri tiujn ĉi malsamajn fenomenojn egale belaj? En kio estas la senco de tiu forto, kiu ĉarmas nian animon?

## Kio estas belo?

"Kio estas belo? Kaj kial ĝin diigas homoj?
Ĝi estas ujo, kiu malplenas,
aŭ fajro, trembrilanta en vazo."
*N. Zabolockij*

En la plej ĝenerala aspekto, belo estas kategorio, signifanta integran harmonion de objekto surbaze de ideala konformeco de formo kaj ideo. Laŭ esprimo de *V. Solovjev* (1990: 358) "ni devas difini belon kiel transformon de materio tra enkorpigo en ĝi de la alia, supermateria komenco". La ekzisto de belo estas nedisigeble ligita kun tiuj universalaj homaj valoroj kiel vero, amo, bono. Vero realigas sin per belo, belo realigas sin per amo, amo esprimiĝas per bono kaj bono realiĝas per vero. Jen estas la vojo por savi homon aŭ "ponto, kondukanta lin el la regno de neceso al la regno de libero" kaj de vera harmonio.

Laŭ *F.M. Dostoevskij*: "belo ĉiam estas utila". "La bezono pri belo evoluas, kiam homo malkonkordas kun la realo, malharmonias, luktas kun ĝi, t.e. kiam li plej plene vivas" (*Stoloviĉ*, 1994: 344-345). Akirante liberon per belo, homo restarigas la perditajn ligojn kun la naturo kaj vastigas la limojn de sia estado. En belo ĉio estas pinto kaj akiras por la homo sian veran sencon: tiam laboro fariĝas kreado, la produktoj de laboro transformiĝas je artaĵoj, la sentoj iĝas amo, devo - bono, neceso - libero, scioj - vero, formo - harmonio, ideoj - humanismo. En la belo la mondo aperas antaŭ homo kiel harmonio. Jen kial belo ĉiam fruktodonas al homoj bonon, sanon, pacon, ĝojon, prosperon.

La homo ĉiam provis fari el belo sian vivkunvojaĝanton, esperante, ke ĝi alportos feliĉon, bonŝancon, protektos kontraŭ malbono. Tial li donas al novnaskito la plej belan nomon, por ke belo ĉiam estu kune kun li aŭ ŝi. Iam bela nomo atendis sian, ne jam naskiĝintan, mastron.

Kiom da belo enkorpigis en la nomon la fantazio de orienta homo! Ĝi estas vera bukedo de eleganteco kaj brilo, egalan al kiu estas malfacile trovi en la mondo. Jen kelkaj ekzemploj: *Ĝamal* (araba nomo)

belo, *Kamil* - (araba) perfekteco, *Ajniamal* - (persa) esenco de belo, *Ajnikamil* - (persa) esenco de perfekteco, *Burĥan* - (araba) belo kiel pruvo mem, lumo, protekto; *Gulĉehra* - (persa) vizaĝo simila al floro, *Gulsara* - (persa) plej freŝa, plej bona floro, laŭlitere - floro, kiu supre kuŝas en korbo; *Saonat* - (taĝika) arto, belo; *Nigina* - (persa) valora ŝtono.

Tute ne estas hazarde, ke en la leksikono de multaj popoloj la belo, amo kaj bono kuniĝas je io integra kaj nedisigebla. En la rusa kulturo tiuj vortoj jenas: bonaspekto kaj bonkreeco, en antikva helena – *kalokagathia*, en antikva ĉina – *ŝang-mej*, en antikva persa (zoroastra) – *ĥvarno*. Notindas, ke la origino de ĉiuj tiuj vortoj estas tempoj malproksimaj, historiaj. La voĉo de antaŭuloj per tiuj ĉi vortoj kvazaŭ komunikas al ni, ke ne permeseblas apartigi belon de bono kaj bonon de belo. "Kaj se antikva konfido al belo forlasos nin - kio okazos al ni?" skribas *S. Averincev* (1988).

## Kontemplado de belo

"Ni eterne serĉos la bordojn, kie ni kantus
kaj estus aŭdataj. Sed kion diri pri la ondo,
kiu disrompiĝas tie, kie eĉ ne unu orelo aŭdos ĝin?
Tio estas la neaŭdeblo en ni, kiu nutras nian plej profundan angoron.
Sed ĝuste tiu ĉi neaŭdebla donas formon al nia animo kaj vizaĝon al nia sorto".
*Ĥalil Gibran*

Kontemplado de belo ofte estas komprenata kiel admirado kaj pietatado. Pietato antaŭ mistero, miraklo, Dio, ĉar "belo estas tie, kie Dio kunestas kun homo" tekstas en "Novelo de Tempaj Jaroj". Jen kial, ĉiufoje, kontemplante belon, homo ekposedas veron kaj pro tio spertas animan ĝojon, ĉarmon kaj pietaton. Ĝuste en belo kaj per belo la homo fariĝas vere feliĉa. Belo estas forto vere mirakla kaj ne hazarde en la rusa lingvo la vorto "mirakla" sinonimas al la vortoj "bela","belega".

## Lumiganta belo

"Nur vi, reĝino Belo,
Liberigas la mondon for de peza kaptiteco".
*Charles Baudelaire* (Lumiganta belo)

Alia reprezento de belo en la monda kulturo estas la lumo, venkanta la mallumon kaj donacanta vivon kaj bonon. La antikva Oriento donas al tio plej bonajn ekzemplojn:



"Miaj okuloj volas ekvidi la sunon,
Mi volas satiĝi je lumo!
Se mallumo foriros, kiom multos brillumado!"
ekkrias *Gilgameŝ* en la fama mezopotamia eposo.

La stelplena ĉielo super la kapo jam ekde profunda antikveco estis traktata kiel fonto de lumo, belo, harmonio, ordo kaj potenco. Precipe brile la belo perceptiĝis kiel ĉiela lumigilo en la zoroastra tradicio. La portanto de dia belo Ĥvarno estas glorigata en himnoj de Avesto kiel sunradianta kreaĵo de la dio *Aĥura-Mazdo* (*Avesta,* 1990: 116-128).

Simila sunradianta kreaĵo estas la diino de fortuno kaj feliĉo, la belega *Aŝi* "elradianta al homoj ĝuon kaj donanta bonan gloron". Sed la fenomeno de lumiganta belo estis jam longe konata ankaŭ en la okcidenta tradicio. La franca poeto *Charles Baudelaire* skribis, ke homon allogas al belo la "brilo de la eterno".

## Belo en primitiva socio

"Diru, de kie venas vi, belo?
Via rigardo - lazuro de l' ĉielo aŭ naskitaĵo de l' infero?"
*Charles Baudelaire* (Himno al la belo)

Ĉu efektive belo posedas radiantan forton de lumo, kiu altspiritigas la homon super la mondo kaj savas lin de morto? "La plej esenca", skribis *Hegel*, "estas la vojo". Kiun vojon do trapaŝis belo kune kun la homo tra la jarcentoj kaj jarmiloj? Jam dum la aŭroro de la homa historio homoj komencis diigi ĉion, kio estis ligita kun belo: la sunon, lunon, ĉielon, stelojn, teron, bestojn, plantojn, bele faritajn aĵojn, fizikan forton, belan nomon, vortojn, gestojn ktp. Malfermo de la belo en la naturo estis la unua malfermo de belo en la historio de kulturo.

La delikata tavolo de konscio ankoraŭ estis forte ĉirkaŭita per emocioj, kaj belo estis perceptata de la homo kiel emocia spektaĵo. La homo serĉis belon en ĉio kaj trovis en ĝi sian gepatran domon, kie li povas savi sin okaze de iu danĝero. La gepatra domo por la prahomo estis rito – ĉio plej bona kaj bela konkretiĝis en ĝi. En la rito belo transformiĝis en materian forton, kaj ĝi helpis al la homo forigi la mallumon kaj konservi la ekvilibron de la vivo. La belo ĉirkaŭis ne nur la surteran, sed ankaŭ la alian mondon. Sendante mortinton al la

alia mondo, homoj turnis sin al la belo por ricevi ties subtenon. La plej grava kriterio dum la elekto de loko por enterigo estis estetika.

## Belo en antikvaj tempoj

"Antikvaj homoj pense imagis belon ĝuste tia, kiu belas per si mem, sed kiu samtempe estas ankaŭ materia kaj kapabla fari ankaŭ pure materiajn agojn."
*A.F. Losev*

La antikva homo perceptis belon kiel plej fidindan garantion, kiel simbolon de la eterna vivo. Per belo oni anstataŭigis perdojn, forigis streĉojn, dissolvis konfliktojn, atingis konkordon kaj unuecon de gento kaj komunumo. Emocie kolorigita percepto de belo anstataŭiĝis (post iugrada evoluo de civilizacio) per la dominanto de korpeco, de plastika formo. Belo ĉiam pli multe asociiĝis kun la belo de la homa korpo, kun la harmonio de formo kaj linioj. Ĉi tiu belo lumigas la vojon de homo al la alia mondo kaj garantias surteran ordon. Tio estis la dua malfermo de belo fare de homo. Unu el la plej fruaj ekzemploj de la nova kompreno de belo (kiel perfekteco de formo kaj korpo) fariĝis la kulturo de antikva Egiptio. Arĥaikaj ideoj pri belo kiel aspekto de eterna vivo ĉi tie kompletiĝas per la realigo de belo en homa korpo.

Eterna vivo de la homo ne eblas sen konservado de la belo de lia korpo. Per tiu ĉi belo oni sanktigis la vojon de homo en la alian mondon kaj garantiis la ordon sur la tero. Belo de korpo, sendita al la homo fare de Dio, estas glorkantata jam en plej antikvaj ĥronikoj kiel forto potenca, kuraĝa, akompananta heroojn kaj profetojn. La forto de belo estis tuŝita ankaŭ de *Zaratuŝtra*:

"Vi estas bela, Zaratuŝtro,
Belega estas vi, Spitamo,
Kun bonstaturaj kruroj,
Kun longaj brakoj.
Al vi donis mi Ĥvarnon" (*Jašt*, 17: 22, vd. *Avesta*, 1990: 116)

En la avesta mitologio belo estas traktata kiel io kompleta kaj harmonie konstruita. La integreco de belo estas en la unueco de trio: bona penso, bona vorto kaj bona ago. La vero, aperinta en la belo, estas supera bono. Favoraj estas deklarataj kaj belo de penso, aperinta en la vorto, kaj belo de vorto, enmetita en ago. Tiu ĉi zoroastra trio en la kompreno de belo kaj bono poste eniris la estetikan fonduson de multaj kulturoj kaj religioj de la mondo.



En la antikva Grekio la belo de korpo, donacita al la homo de Dio, estas deklarata kiel la plej potenca kaj ĉion venkanta. la modelo de la korpa belo estas la agnoskataj Dioj kaj la homo estas traktata kiel krono de ilia kreado. Oni kultas la korpon, ĝin servas temploj, palacoj, ĝin glorigas teatraj prezentadoj, ĝin benas la naturo, la kosmo ktp. La forto de tiu ĉi belo estas tre granda, ĝis nun ĝi ĉarmas niajn animojn per brilaj skulptaĵoj de Afrodito kaj Zeŭso, Apolono kaj Heraklo, per arĥitekturo de Partenono kaj Ereĥtejono.

La fruktiga forto de la antikva helena belo ĉiam pli aktive strebis al Oriento. "Helenismo markis en la arto de Meza Azio la komencon de la tuta epoko," skribas *G.A.Pugaĉenkova*, "laŭ la ekzemplo de Mediteraneo kaj Antaŭa Oriento ĝi allogis la artiston en la mondon de plastikaj linioj kaj eleganteco de formoj. Helenismo pliriĉigis tiun ĉi mondon per harmonio, ĉerpita el la naturo, ĝi donis al la artisto rimedon por esprimi la belon de homa korpo, faris el ĝi mezurilon por ekkoni la belan" (*Pugaĉenkova & Rempel*, 1982: 277).

Kun la fruktiga forto de helena belo pretas konkuri la estetika heredaĵo de la antikva Ĉinio, kie la belo havis sian neripeteblan karakteron kaj specifecon. Tie oni estis konvinkita, ke homo, kompreninta la belon, denove ekposedas senton de sekureco, de kvieto, de unueco, harmonio kun la medio – li kvazaŭ revenas al sia origina esenco kaj fariĝas simila al novnaskito:

"Vespoj kaj venenaj serpentoj - tiun ĉi ne pikas,
Sovaĝaj bestoj - ne mordas,
Rabobirdoj - ne ungegas".
(*Ljujši-Ĉunjcju* 150, p. 267, vd. *Tkaćenko*, 1990:211-212).

La kompreno de la belo en la historio ĉiam pli fajniĝis kaj komplikiĝis, kaj, iom post iom (de emocia dominanto de la arĥaikeco kaj korpa paradigmo de la antikveco) tiu ĉi kompreno transiris la sferon de la spirito kaj en la mezepoko ĝi komencis identiĝi kun "animo, similiĝinta al Dio" (*F.Akvinskij*). "Ĉio, kio estas kreita de Dio, estas perfekta", sed nur la homa animo estas por li eterna, integra kaj sava esenco.

La spirito neis la formon, ĉar ĝi limigis ties liberon. La formo estas maleterna kaj mortema, dum la spirito estas eterna kaj senfina. La spirito celis supren al Dio kaj en tio estis la senco de ĉio estetika kaj morala. Tio estis la tria malfermo de belo fare de la homo. Al la ĉielo strebis ĉio: animo, pensoj, sentoj, scioj, arto, filozofio. La gotiko edukis vidi en ĉio la enkorpiĝon de la spirito, ŝajne, ĝis neebla nivelo. "Ĝi levas en senfinecon la tutan ondantan maron de sagformaj

arkoj. Ĉi tie, se diri esence, tute ne estas iu limigita spaco. Ĝi fakte estas senfina kaj nemateria. Ĝi estas spaco vertikala. "Verŝajne - konkludas *A.F.Losev* (1991: 95-96) - nur pure gotika kompreno de la spaco povis konduki postajn teoriulojn al klarigo de arĥitekturo kiel tutsolidiĝinta muziko".

La mezepoka estetiko estas multaspekta. Sed ĝin unuigas komunaj fundamentoj. Realaj formoj de korpa harmonio anstataŭiĝas per stilizitaj, simbolaj formoj. la belo de formo kaj de viva impreso cedas lokon al la belo de koloro, simbolo, signo, asketa senmoveco. La tuta rusa mezepoka kulturo perceptis belon kiel sanktecon, kaj sanktecon kiel belon (*Averincev*, 1988). Karakteriza trajto de la arto en Meza Oriento estis dekoreco. Ĉion, kion vidas la homo, oni nepre "vestas" en ornamon. La animo de la objekto estas ne formo, sed ornamkolora komponaĵo.

Nekompareblajn laŭ belo pentritajn ceramikaĵojn produktis artmetiistoj de Samarkando. "La arta potfarado de Samarkando impulsis la tutan Maveranaĥron*" (*Pugaĉenkova & Rempel,* 1982: 206). En la timurida epoko Samarkando estis ĉirkaŭita de ĝardenoj kun belaj nomoj: "Ĝardeno Ornamaĵo de la Mondo", "Paradiza Ĝardeno", "Ĝardeno, ĉarmanta la koron", "Ĝardeno de Kontentiĝo", "Ĝardeno kie vivas Feliĉo" (*Pugaĉenkova,* 1987: 174).

* Esperantigo de la araba nomo *Maverannaĥr*, t.e. la teritorio inter la du riveroj *Anuc-Darja* kaj *Sir-Darja* kun la centroj en Samarkando kaj Buĥaro (ekde la 7-a jarcento p.K.)

## Belo en la epoko de la Renesanco

"Kaptitas mi de l' amo, ligitas mi de l' belo.
Kaj nur antaŭ tio ni brulas pro l' amo,
Kio al ni atingeblas per ties ĉarmo".
*Michelangelo*

Kun la epoko de la eŭropa Renesanco estas ligita la kvara malkovro de belo – la spirito ĉiam pli pleniĝas per homa karno kaj jam aperas kiel individue esprimita fenomeno. La belo de individueco fariĝas la ĉefa temo de la epoko. La Renesanco fine pacigis la spiriton kun la korpo, kaj liberigis la homon de la monopolo de la eklezio.

Sed la Renesanco liberigis la homon ne senhelpe de la belo, sed ĝuste danke al ĝi. En la religiaj pentraĵoj de *Raffaelo Sanzio*, *Leonardo da Vinci*, *Michelangelo*, *Tiziano Vecellio* kaj aliaj, belo apartiĝas de la religia ideo kaj fariĝas memstara forto.



La forto de belo en iliaj pentraĵoj jam tiom grandas, ke ĝi deflankiĝas de la sankta objekto kaj kondukas la homon post si. La Renesanco unuafoje faris la belon "objekto de speciala estetika plezuro". "Ikono fariĝis portreto, kaj bildo de sanktaj eventoj – teatra spektaĵo" (*A.F.Losev*, 1982: 212).

## Belo kaj harmonio

"Harmonio de l' mondo estas streĉita
je diversaj flankoj"
*Heraklit*

La belo de naturo, formo, spirito kompletiĝis per la belo de sono – muziko, en tiu ĉi harmonio naskiĝis kulturaj ĝardenoj de Baroko kaj heroaj idealoj de Romanikismo. Kaj la filozofo *Kant* proklamis la homon (kaj en li la homaron) kiel la veran idealon de belo; poste ankaŭ *Dostoevskij*, *Solovjev*, *Berdjaev*. Tio estis pozitiva limo en la historia evoluo de belo.

Hodiaŭ ni pli ĝuste komprenas, ke la sorto de la homo estas plene ligita kun la sorto de la tuta homaro. La homo ne estos feliĉa ĝis tiam, kiam la homaro estos en harmonio kun la mondo. Sed harmonio ne povas esti sen memesprimo de la nacioj, kiuj formas la homaron. Ja ĉiu harmonio estas diverseco en unueco. Belo ne povas ekzisti sen diverseco.

La historio senlace agordis la homan racion al pureco de perceptado de belo. La monda historio estas ne nur elstara poetino, sed ankaŭ brila pentristino. Danke al ĝi ni pli bone konscias, ke nur en dialogo inter kulturoj de plej diversaj popoloj de la mondo naskiĝas vera harmonio. Nur pere de dialogo de diversspecaj tradicioj, vivstiloj, valoroj, la kulturo de ĉiu aparta nacio akiras sian veran lokon sub la suno kaj pro tio efektive aliĝas al la tuta homaro. Belo en sia fina esprimo ĉiam estas neripetebla, dum malbelo estas senvizaĝa. Same kiel lumo ebligas al ni diferencigi aĵojn inter si, fiksante iliajn diferencojn, tiel mallumo nuligas tiujn ĉi diferencojn, tiamaniere kondukante al malbelo.

Do, kulturo, aperinta en belo, ĉiam jesas la specifecon de nacio, formas ties koloron kaj ornamon en buntkolora paletro de universalaj homaj valoroj. Sed ĉia specifeco baziĝas je kono de si mem, de sia kulturo, de sia heredaĵo kaj tiu de aliaj. Scio estas ĉiam ekkono de diferencoj. Kaj ĉia diferenco estas ekkonata per komparo.

Tio signifas, ke ne eblas evoluigi la belon de la kulturo, ties nacian specifecon kaj allogan forton sen ĝia malfermiteco al la mondo, sen kultura dialogo kaj komparo.

**Belo kaj arto**

"Arto estas standardo de venonta sintezo"
*N.K. Roerich*

La arto estas la plej grava rimedo de kultura dialogo. Kulturo pere de arto venigas al ni belon. Sed ĉi tie la ligoj estas reciprokaj. Arto konfirmas sin en belo, belo konfirmas sin en arto. Belo kaj arto estas fratoj-ĝemeloj. Ili havas la saman patrujon – imagpovon. Vigla imagopovo ĉiam estas spirita forto, kiu formas kompletecon de estado. Arto kiel pinto de spiriteco "ĉiam estas orientita al belo" (*N.Berdjaev*), kaj nur en ĝi la spirito akiras kompletecon kaj sencon de estado, t.e. atingas la celon. En artaj verkoj belo rigardas nin en la vizaĝon, ĉar "la spirito en ili fariĝas videbla" (*Plotinus*). Danke al tio estas atingata viva harmonio kaj kuniĝo de la spirita kaj materia, kaŝita kaj klara, finhava kaj senfina, provizora kaj eterna.

Arto ĉiam estas pacama kaj pli ol io ajn ĝi estas humana laŭ sia esenco. La bezono pri alta arto ofte plifortiĝas dum dramaj turniĝoj de historio. Eĉ ne unu granda historia turniĝo en la socia evoluo povis vivi sen arto kaj sen belo. Ajna revolucio estas nihilismeca, sed dum ties tuta nihilismo ĉiu el ili kreas sian arton, ĉar nur en ĝi povas vivi revolucia romantiko. Arto helpas superi timon – timon de soleco, timon de malcerteco, ĉar ĝi donas al la homo tion, kion li bezonas, tion kio al li mankas, kio lin trankviligas. "Dum ĝuado de la belo nia tuta naturo funkcias en sia nedisigebla integreco, pleneco", skribis rusa filozofo *N.I.Nadeĵdin* (vd. *Stoloviĉ*, 1994: 94) En arto homo rezignas pri izoleco de la mondo. "Danke al sperto de superado, arto montras al ni limojn de la ebla en la vivo" (*V.Kraus* 1994: 249), kaj faras homon vera kreanto de la estado, edukante en li "tutmondan kompatemon" laŭ *Dostoevskij*. "La vivo estas tuta arto, vivi signifas fari artan verkon el si mem (*F.M. Dostoevskij*, vol. XVIII, 1978: 13).

Precipe emocian kaj inspiran forton posedas la pentroarto. Ĉi tie ĉio estas obeema al harmonio kaj konkordo, ĉi tie paco venkas perforton, lumo – mallumon, amo – malamon, bono – malbonon, vero – malveron, vivo – morton ktp. Efektive, "pentroarto estas la lerteco teni en siaj manoj la tutan mondon" (*Dun Cigan*) kaj foje – kiam tiu



ĉi mondo fendiĝas en kontraŭstaro – nur pentristo savas ĝin de la forpereo. Pri tio elokvente atestas la historio.

Kiu savis por ni la kulturon de Egiptio, antikvaj Grekio kaj Romo, civilizacioj de la inkaoj, majaoj, aztekoj? Ĉu ne kreantoj, antaŭ ĉio pentristoj famaj kaj nekonataj, kies kreaĵoj, superante la tempon, alportis al ni vivajn radiojn de lumo? La morto de la tempo formanĝis ĉion, kion ĝi povis – sed la arto evidentiĝis pli forta ol la tempo. La historio instruas: vivo povas venki morton, se tiu ĉi vivo apogas sin je la arto.

**Lecionoj de belo**

"Instruisto, rakontu pri la estado. Kio estas 'esti'?
Sekvi la Belon, eĉ se ĝi alkondukos vin al la pleja
rando de l' abismo kaj, eĉ se ĝi estas flugilhava kaj vi ne,
se ĝi decidos superi la abismon - sekvu ĝin,
ĉar kie ne estas Belo, tie estas nenio".
*Ĥalil Gibran*

Lecionoj de belo ne estas lecionoj de egoismo, sed de frateco. Kvardek jarojn antaŭe *Albert Camus* rimarkis, ke "belo ankoraŭ ne sklavigis eĉ unu homon. Male, jam dum longaj jarmiloj ĉiutage kaj ĉiumomente belo konsolas milionojn da ekspluatataj homoj, kaj iam ĝi por ĉiam liberigas iujn el ili". La filozofo faras tre gravan konkludon: "Belo devas kontribui al malfortiĝo de doloro kaj al atingo de liberiĝo de la homo" (*Camus*, 1990: 373-374). Tiun ĉi helpon pleje bezonas homoj dum transiraj etapoj de sia historio.

Sur kio ni apogas nin en malbonaj tempoj? Sur imagpovo, kompletiganta por ni la fendiĝantan realon, sur la belo de objekto, idealo. Ĉu ne belo enkorpigas eternon, normojn, ordon, harmonion? Kaj sur kio do povas apogi sin homo dum la senĉesa ŝanĝiĝo de transira epoko - kiam ĉio malnova kaj nova konfliktas inter si, kiam ĉio balanciĝas, ĉio moviĝas, ĉio ne klaras?

Mi ne eraras se mi diras: ĝuste sur la belo. "Dum katastrofoj, mizero kaj timo antaŭ estonto, la bezono pri arto iĝas pli profunda kaj pli forta ol dum tempo de bonstato" (*Kraus* 1994: 245). Sur la belo de la naturo sin apogis la prahomoj, savante sin de sia propra fizika malforteco. Sur la belo de la Dia esenco de la homo sin apogis la unuaj profetoj: Moseo, Zaratuŝtro, Kristo, Mahometo dum sia kontraŭstaro al paganoj. Sur la belo de la antikva realismo apogis sin la kreintoj de la Renesanco dum la batalo kun la mezepoka dogmis-

mo. Sur la belo de la racio sin apogis la kreintoj de scienco, direktante la kulturon al teĥnotrona erao. Sur la belo de la kulturo ni apogas nin hodiaŭ komence de la XXI-a jarcento serĉante novan integriĝon de la mondo (*Ionesov* 2001). Kaj kiam ni, revivigante la kulturon, turnas nin al la belo, mi denove vole aŭ nevole rememoras la vortojn de *F.M.Dostoevskij*: "Se en popolo konserviĝas la idealo de belo kaj la bezono pri ĝi, tio signifas, ke estas bezono pri sano, pri normo kaj sekve tiamaniere estas garantiata ankaŭ la supera evoluo de tiu ĉi popolo" (vd. *Stoloviĉ* 1994: 345). Kiu do krom *Dostoevskij* pli bone sciis, ke reveno al belo estas gravega kondiĉo por la apero de "bona realo" kaj, fine, por la savo de la mondo.

## Literaturo

1. *Averincev S.S. Krasota kak svjatost'. Kurier Unesco*, Julio 1988.
2. *Avesta. Izbrannye himny*. Traduko el la avesta lingvo kaj komentarioj de prof. *I.M. Steblin-Kamenskij. Duŝanbe, "Adip"*, 1990.
3. *Dostoevskij F.M. Polnoje sobranije soĉinenij*. En 30 volumoj. Vol. 18, *Leningrad, Akademija nauk SSSR*, 1978.
4, *Ionesov V.I. Krasota kak faktor kultury. Samarskaja oblast'. Informacionnyj vestnik N* 1 (9) 2001, p.31-35.
5. *Camus A. Buntujuŝĉij ĉelovek. Moskva, Politiĉeskaja literatura*, 1990.
6. *Kraus V. Nigilizm i idealy. Moskvo, Raduga*, 1994.
7. *Losev A.F. Filosofija. Mifologija. Kultura. Moskva, Politiĉeskaja literatura*, 1991.
8. *Losev A.F. Estetika Vozroĵdenija. Moskva, Mysl'*, 1982, 624 p.
9. *Puganĉenkova G.A. Iz ĥudoĵestvennoj sokroviŝĉnicy Srednego Vostoka. Taŝkent*, 1982.
10. *Pugaĉenkova G.A. & Rempel L.I. Oĉerki iskusstva Srednej Azii. Moskva, Iskusstvo*, 1982.
11. *Solovjev V.S. Krasota v prirode. Soĉinenija. Moskva, Mysl'*, 1990.
12. *Stoloviĉ L.N. Krasota. Dobro. Istina. Oĉerk istorii estetiĉeskoi adsiologii. Izdatelstvo Respublika, Moskva*, 1994.
13. *Tkaĉenko G.A. Kosmos. Muzyka. Ritual. Mif i estetika v "Ljujŝi-Ĉunjcju". Moskva, Nauka*, 1990.

## Adreso de la aŭtoro

*D-ro Vladimir I. IONESOV*
*P.O. Box 3004*
*RU - 443099 S a m a r a* / RUSIO
roman@vis.infotel.ru

## Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro de Samara Jura Instituto, fondinto kaj prezidanto de Samara Kulturologia Societo "Artefakto - Kultura Diverseco", Samara.



# Iom da parazitologio

*Rüdiger SACHS*

## Enkonduko

Kiam aŭtoro decidas verki internacilingvan artikolon pri sia speciala fakkampo, li prudente agus se li unue informiĝu pri a) kiom da esperantlingvaj samfakuloj ekzistas kaj b) kiom da interesatoj pri sciencaj aferoj, kvankam nesamfakuloj, interesiĝos pri tio, kion li volas peri al siaj legantoj – same kiel bona oratoro ja ankaŭ alĝustigas sian paroladon al la komprennivelo aŭ faka kompetenteco de sia aŭskultantaro.

Pri esperantlingvaj samfakuloj informas la Indekso de Fakdelegitoj en la Jarlibro de Universala Esperanto Asocio (UEA) kaj la Internacia Sciencista Dokumentaro (ISD) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Pri supozebla sciado de legantoj informas la kritika taksado de la ĝenerala intereso pri tio, kion oni volas peri al la legantaro. Kaj pri la kompreno (okaze de uzado de profesia fak-lingvaĵo) ĉe la Esperanton parolantaj scienc-scivolemaj "laikoj" informas, en ne malalta grado, la ekzisto de la koncernaj prifakaj terminoj en la malnova PIV (1987) resp. en la nova NPIV (2002).

## Maloftas en la esperantlingva sciencistaro: parazitologo

Nu, mi parolas kiel parazitologo. Pri tiu fako – kiun mi ne speciale studis, sed kiu konfrontadis min dum mia tuta profesia vivo, antaŭ ĉio dum la laboro en tropikaj landoj – troviĝas samfakuloj nek en la UEA-fakdelegita indekso nek en la ISD de la Akademio Internacia. Ankaŭ "veterinaroj" ne troveblas en la UEA-jarlibro, almenaŭ ne en la 2003-a eldono – des pli malverŝajne estas, ke ie estas trovebla la speciala fako de veterinar-parazitologoj. Inter la kuracistoj ja eble estas kelkaj, kiuj jam fuĝigis cestodon kaj aliajn vermojn el pacienta intestaro aŭ kuracis (kun multe da zorgoj pri la danĝereco de la koncernaj medikamentoj) iun pacienton suferantan de malario aŭ dormo-